

Numero: 253.  
Junio: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Se venas inundo

Ĉi somero komenciĝis kun grandega inundo. Danubo montris sian forton timigante homojn, kiuj loĝas proksime al la riverego.

Dekmiloj da homoj laboris plenigante sakojn per sablo kaj fortigante la digojn.

Inundo nur venis kaj venis trakurante landojn. Dumvoje ĝi ruinigis domojn kaj konstruaĵojn.

Eble ĉi inundo estas averto por la homaro, ke ankoraŭ la naturo estas la grandsinjoro, kiu povas superi la homon kiam ajn. Ni estis punitaj, ĉar ni estas malbonaj mastroj tie ĉi sur la terglobo.

Sed la homo kontraŭstaris la atakon, kaj heroe luktis ĝis la lasta venko.

En Hungario la inundo kaŭzis domaĝon, sed ĝi ne povis superi nian popolon, ĉar la homoj unuanime kuregis helpi unu la alian. Ili konstruis la digojn, pumpis la inunditajn teritoriojn kaj dume la akvego fluis kaj fluis.

La rivero furiozis, sed ĝi ne povis forlasi la fluejon, ĉar la homa volo kaj forto staris kontraŭ la vojo.

Kiam tiu ĉi artikolo estas skribata, la verkanto ne scias la finrezulton. Sed kiel la tempo pasas, tiel kreskas la espero, ke la homo estos la venkinto.

La hungaroj denove montris sian forton. Venis helpantoj ankaŭ el ekster la landlimoj al Malgranda-Hungario. Precipe la tieaj hungaroj kaj sikuloj, kiuj sentis, ke nun ni kune devas agi kontraŭ la giganta inundo.

Vere neniu amaskomuniko sciigis pri esperantistaj helpantoj, sed mi estas certa, ke inter la laborantoj ankaŭ ni estis tie. Multaj eksterlandaj geesperantistoj sendis al ni mesaĝojn, en kiuj ili kunsentis kaj anime kaj kore estis kun ni.

Grandioze scii, ke ni ne estas solaj. Multaj, multaj gesamideanoj apogas nin en la tuta mondo.

Tiel ĝi estas bone. La terglobo estas tro malgranda por ke ni ne sciu unu pri la alia, se ni havas ĝojon kaj malĝojon.

Espereble la inundo de la jarcento baldaŭe forlasos la Karpatbasenon kaj „la blua Danubo” denove estos milda kaj ĉarma.

-Redaktanto-



## Kia homo estas esperantisto

Kia homo estas esperantisto? – Ĉu vi demandas min, amiko?

Nu aŭskultu min! Ankaŭ li aŭ ŝi estas nur homo, kiel vi. Ĉu vi miras? Kial? Ĉu vi pensis, ke esperantisto estas stranga estaĵo?

Ankaŭ li aŭ ŝi havas du okulojn, du orelojn. Kelkaj el ili ĉefe la viroj estas kalvaj. Ĝenerale li aŭ ŝi havas tridek du dentojn aŭ malpli, se ili ne estas eltiritaj.

Ja, ankaŭ li aŭ ŝi parolas iun gepatran lingvon. Se li aŭ ŝi lernis lingvojn en la lernejo aŭ private, tiam certe li aŭ ŝi balbutas fremdajn lingvojn.

Tamen kio estas la diferenco inter esperantisto kaj alia homo?

Nepre devas esti diferenco, kio perfidas pri iu, ke li aŭ ŝi estas esperantisto.

Ne serĉu eksterajn signojn! La diferenco kaŝiĝas en la koro, kie estas ege, ege malgranda tirkesto kaj tie ĝi estas trovebla.

Tiu homo, kiu ellernas la zamenhofan lingvon, post la lernado baldaŭ, ofte jam dume malfermiĝas la eta tirkesto, kaj el ĝi mistera sento eliĝas disvasiĝante en la tuta korpo kaj animo. Plu li aŭ ŝi ne povas liberiĝi de tio. Ĝi infektas la uzanton de la lingvo.

Ĉie li aŭ ŝi komencas paroli pri interna ideo kaj volas konvinki familianojn, geamikojn kaj gekolegojn lerni Esperanton.

La neinfektiĝantaj homoj ofte priridas lin aŭ ŝin, sed kiam ankaŭ ili ricevos ĉi tiun strangan malsanon, ankaŭ ili ŝanĝiĝas kaj la morbo rapide disvastiĝas.

Eble alvenos tago, kiam la tuta terglobo infektiĝos kaj la verda malsano inundos ĉiun homon.

Espereble tiam jam neniu demandos, kia homo estas esperantisto?

Bedaŭrinde nuntempe ankoraŭ geesperantistoj ŝajniĝas stranguloj, kvazaŭ li aŭ ŝi estus veninta de sur malproksima planedo el la vasta universo.

Ne, tiuj homoj vivas ĉi tie inter ni. Ili ĉiam vivis sur Tero. Ilia revo estas disvastigi la internacian lingvon, kaj helpi la ĉiutagan komunikadon inter diverslingvaj homoj.

Eble en iu tago ilia sonĝo realiĝos, kaj plu li aŭ ŝi ne estos strangulo en la okuloj de siaj homfratoj, ĉar Esperanto fariĝos la dua gepatra lingvo por ĉiu.

Nu, amiko, tia homo estas esperantisto. Espereble mia respondo kontentigis vin. Ĉu ne?

-Ŝaŝa-



## LA SAMAN TAGON EN LA SAMA URBO LA SAMAN TAGON EN LA SAMA URBO

Verkis Miric Jadranka la 26an de Majo 2013.

Sabina estas deknunajara knabino. Bela, alta kaj gracia. Ŝia haŭto iom distingiĝas de aliaj knabinoj pro ŝia roma deveno.

Ĉiutage ŝi iras en lernejon kun sia pli juna frato. Li nomiĝas Rade. Ĉi-foje ili gaje interparolas. Ili ĵus konsentis kiel ili pasigos la vintrajn feriojn.

Ŝi havas du bonajn geamikojn. Unu el ili estas ŝia kamaradino Milena. Ambaŭ knabinoj estas bonhumora, kantemaj, kaj ili tre ŝatemas danci en sia libera tempo.

La frato de Sabina ofte akompanas ilin kie ajn ili estus. Li estas bona ŝakludanto, sed li ne havas eblecon ekzerci ŝakon, kvankam li estas scivolema kaj konkurso-partoprenanta knabo. Jam li gajnis premion por la unua loko kiel debitanto - la plej juna knabo partopreninto.

Hodiaŭ ili deziras sledi kun lia nova kamarado el la strato. Tuthazarde li ekkonis lin.

Do, Tomo - tiel li nomiĝas - piediris atente por ke li ne falu sur frostan grundon, ĉar la ekstera temperaturo estis -3gradoj de Celsiuso, kaj neĝtavolo sub liaj piedoj estis pli ol 10 cm-oj, kaj ĉar lia avino Jana estis falinta ĝuste ĉi-tie, antaŭ la montrofenestro de ĉi tiu apoteko. Ŝi falis rompinte la maldekstran kruron..

Jes, estas danĝere iri laŭ glacia strato.

Foje, kiam li preterpasis lian najbarinon Dragica portanta grandajn pezajn sakojn, ŝi subite ŝancelite flankiĝis, preskaŭ estis falinta sur postajojn, se li kaj lia nova konulo Tomo ne ekkaptis ŝin je subbrakoj. Tomo estis lia samaĝulo, eĉ ili kune vizitis la saman lernejon je granda surprizo de Rade.

Liaj adeptoj, la patro Ivan kaj la patrino Sladjana estis grandaj amantoj de montogrimpado. Ili jam suprengrimpis la plej altan montopinton Rtanj, la montego el ilia ĉirkaŭaĵo. Ili estis ankaŭ bonegaj skiistoj.

Apud la urba mini-skivojeto troviĝanta en Kraljevica arbarparko, kolektiĝis multaj infanoj. Tie videblas multaj plenkreskuloj kaj iom da maljunuloj. Verŝajne iuj el ili estis gepatroj de ĉeestantaj infanoj, aŭ spektantoj rigardantaj la gajan kriaĉantan infanaron, kiuj senlace malsuprenglitadis slede kaj poste supreniradis helpante per apudvoja skilifto, ĉar la vojo estas longa, pli ol 600 metrojn /oblikva je 35gradoj/ ĝis altaĵo de 300 metrojn

.La ĉefa prizorganto pri eventuala akcidento estis kuracisto, ĵus diplomita junulo.

Li estis tre amata kaj laŭdita pro siaj kapablecoj kaj seriozeco. Multaj ĉeestantaj fraŭlinoj plezure ĵetadis scivolemajn rigardojn al li.

En ĉiu urbo ekzistas ia speco de virino, kiun oni kutime nomas ĉionvidanta aŭ ĉionscianta. Ŝia nomo estas Marina. Ĉiu nomas ŝin "Radio Mileva!" allude al ŝia inklinado, ke ĉiam estu en la centro de la okazaĵo.

Iel kaŝita en arbaro, ĉirkaŭata de diversaĝaj infano, ekpaŝas pave kiel ĉies favoratino, belulino Ana. Ŝi estis bela junulino, sindonema belsonvoĉa modeste vestita, kies longa nigra hararo estis enplektita en du harplektaĵoj dum ŝiaj nigraj okuloj imprese brilis.

Ŝia praavo estis iama fama triba magiisto. Ana loĝas en antaŭurbo en la domo iom izolita, rande de la arbaro. Ŝi loĝas kun sia malsana frato, kripligita dum la lasta okazinta milito. Ŝia patro estis ankaŭ malsana. Malgraŭ multaj necertecoj ili vivis modeste neniam almozante.

Por esti interesa kaj tre vivreala rakonto, ĉi-tie ĉeestas gejunuloj, la ĝemeloj Trajko kaj Rajko.

Ili estis dudek kvin jaroj denaskaj el Francio, aŭ Aŭstralio. Neniu sciis, ĝuste de kie ili venis en nia urbo. La pli maljuna ĝemelo nomiĝas Trajko kaj 5 minutojn pli juna frato Rajko.. Iliaj gepatroj estis divorcigitaj riĉuloj, tre bonedukitaj homoj, sed ilia difekto estis "estu ĉiam riproĉemaj".

Ili loĝis en la granda vilao, duetaĝa domo kun belega florigardeno antaŭ la domo. La patrino Javorka, blondulino, maldika persono, mezalta, iom inklina kredi al profetoj kaj unuavice en horoskopo el Planedaroumo/t.e, influo de la planadoj al nia ĉiutageco sur nia surtera vivo/.

(daŭrigota)



## Pri imaga vojaĝo

-Fantasta vojaĝo-

X.

Ĝenerale sinjoro Esperulo ŝajnis simpatia, sed tamen mi timis de li. Laŭ mi li estis frenezulo. Estus bone eviti tiajn personojn – mi pensis.

Mi mallonge respondadis al liaj demandoj esperante, ke li rimarkos mian indiferecon kaj li lasos min trankvile.

-Bánhidi, Bánhidi – li diradis. – Antaŭ cent jaroj vivis similnoma homo Bonyhádi sur la insulo. Laŭ mia scio nun li vivas en fora planedo Neburio. Ĉu vi konas lin?

- Ne. Mi ne scias pri kio vi parolas sinjoro – mi respondis kaj volis ekstari por forlasi ĉi frenezulon. Sed li ekprenis mian brakon kaj restigis min:

-Ne foriru, sinjoro! – li petis min. – Ne ĉiutage oni renkontiĝas kun novalveninto. Iam ankaŭ mi vivis kiel vi, sed dank' al la Moŝta grafo Bonfarulo li ebligis loĝi al mi en nova mondo. Komence ankaŭ mi malfacile al kutimiĝis al la ĉi tiea vivo, kie haltas la tempo.

Je tio mi eklevis mian kapon.

-Kion faras la tempo? – mi demandis mire.

-Haltas la tempo.



-Kiel ĝi povas okazi?

-Tion mi ne scias – respondis Esperulo. – Onidire li eltrovis ion, kio povas influi la tempon. Sur la insulo ne ekzistas tempo. Por ĉiam vi restos tiom aĝa, kiom vi estas nun. Ekster la insulo jaro sekvas jaron kaj la homoj maljuniĝas. Ni ne ŝanĝiĝas. Grandioze. Ĉu ne?

-Sinjoro, mi ne komprenas, kion vi diras. Eble vi havas bonan fantazion – mi ekprovis humore liberiĝi el la societo de la sinjoro Esperulo.

-Mi vidas, vi ne kredas min – li ekridis. – Baldaŭe ankaŭ vi konvinkiĝos, ke mi ne rakontis al vi pri nuboj.

-Bone, mi estas scivola kaj mi deziras ekkoni ĉi tiun fantaston eltrovaĵon.

-Tial vi estas ĉi tie – li diris kaj montris al la direkto de junulino, kiun mi renkontis sur la ferdeko de la ŝipo – Rigardu, ankaŭ ŝi estas pli ol miljara. Dum jarcentoj li ŝanĝiĝis nenion. Ĉu nun jam vi kredas min?

Mi ne sciis, kion respondi al li. Eble mi nur songas. Sed kiam mi vekigiĝos?

-daŭrigota-

## Poezio

Vojo nia ankoraŭ longas

Nuntempe vortoj belaj  
trapasas la ĉielon  
kaj fluas tra la maro.  
Ni ne atendas monaton.

Kaj malgraŭ esti en alia loko,  
ĉiutage en ĉambro via,  
ĝis la fino de nokto longa  
vi atendas telefonvokon.

Sed la beleco de ĉiu vorto  
neniam malkovras enhavon.  
Ni ambaŭ devas fariĝi paro  
komprenanta aman esencon.

Espero ankoraŭ estas en marego;  
parolo ankoraŭ ne montras frukton  
kaj ni ankoraŭ ne havas posedantojn.  
La Eternulo skribis homan destinon!

(Noemuti-Timoro, marte 2011  
Esperantigita el la poemo "Au umasan ulan",  
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes  
Manhitu )



# Por infanoj

## Vulpopanjo kaj ŝiaj idetoj

En apudbarbara kavo loĝis vulpopanjo kun siaj idetoj. La tri vulpidoj ĉiutage nur bubadis de mateno ĝis malfrua vespero. Ili donis multe da laboro al sia patrino.

En iun tagon la etuloj forvadis en la densa arbaro. Ili ankoraŭ neniam estis tie sola. Ilia patrino ĉiam akompanis ilin kaj ĝi montris ĉion.

Tial vulpidoj bone konis la arbaron. Ili feliĉe kuradis de arbo al arbo. Dume ili ne rimarkis, ke forlasis la arbaron kaj subite ili trovis sin sur belega, flora kampo.

Ĉi tie ankoraŭ ili ne estis. Ĉio estis nova por ili.

Komence ili gaje rigardadis la bonodorajn, kolorajn florojn.

Ĉe la fino de la kampo estis vilaĝo. Ĝi ege vekis la atenton de la vulpidoj. Vere iam ilia panjo rakontis al ili pri la vilaĝo kaj tiam ŝi petis ilin, se estas eble evitu ĉi tiun lokon, ĉar en la domoj loĝas la homo, kiu estas danĝera ulo. Krome homo havas kvarpiedan amikon, kiu tre similas al ili. Tamen ne estas bone amikiĝi kun tiu besto, ĉar ĝi servas la homon.



Pri tio la idetoj forgesiĝis kaj ili decidis, ke vizitas la vilaĝon. La plano ŝajnis grandioza. Ili esperis, ke tie la homo akceptos ilin amikeme kaj ili estos regalitaj per iuj bongustaĵoj.

La tri vulpidoj ekiris al la vilaĝo kaj ili apenaŭ atendis la renkontiĝon kun la vilaĝanoj.

Ĉe la unuaj domoj ankoraŭ ĉio estis normala. Ili vidis neniun. Estis tagmeze, kaj la homoj tagmanĝis. El ĉiu domo bonodoro eliĝis.

-Ho, kiom da bonodoro! – ili diris samtempe kaj en ilia kapo tuj naskiĝis la decido.

Ili eniros domon kaj ili petos tagmanĝon. Certe la domanoj ne estos malavaraj kaj ili ricevos ion.

Dume la vulpopanjo tre ekimis. Ĉie ŝi serĉis siajn etulojn. Ŝi renversis la tutan domon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

-Kie vi estas karuloj miaj? Elvenu el via kaŝejo. Via panjo faris por vi bongustan tagmanĝon el bela kokido.

Vane ŝi kriadis kaj traserĉis la tutan arbaron. La tri vulpidoj nenie estis trovitaj. Tio ege malĝojiĝis ŝin kaj plorante ŝi sidiĝis sur arbotrunkon. Ĝuste tie flugis birdeto kaj ĝi demandis de ŝi:

-Vulpopanjo, kio okazis? Kial estas larmoj en viaj okuloj?

-Ho, birdeto, mia malĝojo estas granda. Mi ne trovas miajn idetojn. Ili malaperis. Ĉu vi vidis ilin?



-Vi havas bonŝancon vulpopanjo – diris la birdeto. – Mi vidis ilin irantaj al la proksima vilaĝo.

-Ve! – ekkriis la vulpopanjo. – Tie vivas la homo kun sia kvarpieda amiko, la hundo. Ili kaptos miajn karulojn. Birdeto, montru al mi la vojon kaj ni tuj ekiru por savi ilin!

La vulpopanjo kun birdeto ekiris al la vilaĝo.

La homoj ne rimarkis la vulpidojn, kiuj eniris la korton. Dank' al Dio ankaŭ la hundo estis okupita pri la ricevita, granda ostoj.

Ili libere povis iri kien ajn en la korto kaj ĝardeno. Antaŭ ol eniri la domon ili decidis ĉirkaŭrigardi en la kokinokorto. Ili ankoraŭ ne vidis ĝin. Tie multaj kokinoj estis, sed kiam ili ekvidis la vulpidojn laŭte ili komencis kriadi. La kortobirdoj timeme kuris de antaŭ la praaj malamikoj. Ili ne sciis, ke la tri neatenditaj gastoj estas nur scivolemuloj, kiuj ankoraŭ neniam estis en tia loko kaj nun ili ne volas malbonon al la kokinoj.

Estis granda kriado en la korto. Je la bruo ankaŭ la hundo ĉesis la tagmanĝon kaj ĝi tuj kuregis al la kokinokorto.

En la lasta momento alvenis la vulpopanjo. Se ŝi estus malfruinta nur unu minuton, la tri vulpidojn la timiga hundo kaptus.

-Ĉi tien, ĉi tien! – kriegis la vulpopanjo. – Kuregu rapide por savi la vivon!

Tiam jam ankaŭ la tri vagabundoj vidis la dangeron, kaj serĉante truon sur la barilo eskapis. La truo estis tiom malgranda, ke la hundo ne povis eliĝi tra ĝi. Tiel la vulpidoj saviĝis. Ili kuregis senhalte ĝis la arbaro kaj tie ili ekripozis. La vulpopanjo tiel alparolis siajn idetojn.

-Karuloj, preskaŭ kaptis vin la timiga hundo, ĉar vi estis senpripensaj. Nun ni iras hejmen kaj ekde morgaŭ mi instruos al vi, kiel akiri kokinon el la birdokorto de la homo. Ne forgesu, vulpo ĉiam estu ruza antaŭ ol ekiri akiri kokinojn.

La tri vulpidoj trankviliĝis, kaj ili decidis, ke en la estonto ili sekvos la instruojn de sia panjo.

-Onklo Adalberto-



# Hungario

# Hungario

